**N I A   V O Ĉ O**
**Madrida Esperanto-Liceo**
San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13 -3º-7

Ekde 1985 redaktas kaj eraras: Lupe Sanz
**MARTO 2009**

150-a naskiĝdatreveno de la kreinto de Esperanto, d-ro L.L.Zamenhof
Foro "Esperanto y Zamenhof, desafío a Babel"   25/26 aprilo.
Organizas Esperanto-Liceo de Madrid
**Centro Dotacional Integrado. c/ Canarias 17**. (Metroo Palos de Moguer)
Koruso "Verda Stelo" kiu celebras sian 25an datrevenon aŭspiciita de la Liceo.
Koruso "Esperanto" ¡surprizo de 2009!
Kaj ankaŭ prelegoj, interesaj debatoj, ekspozicio de libroj  k.t.p.

**EN HISPANIO**

Dum la Kongreso de KEA en Sabadell, **Abel Montagut** prelegis pri "Esplorvojaĝo", la lasta nefinita verko de Jules Verne**,** en kiu Esperanto devis havi signifan rolon. Nun Abel Montagut aperigis longan interesplenan artikolon pri la temo en Libera Folio. http://www.liberafolio.org/2009/vernesperanto3/

En la hispana reta gazeto SOITU ES, **Toño del Barrio** verkis artikolon pri la fenomeno de la usonaj retejoj kiuj apogis la nunan Prezidenton Obama; en unu el tiuj retejoj (Change.org) aperis kaj disvolviĝis tre sukcese propono favora al la instruado de Esperanto en usonaj lernejoj, kiu ricevis apogon de 3.500 homoj kaj aperas inter la 35 gajnintaj ideoj.
http://www.soitu.es/participacion/2009/01/21/u/tonyo_1232577498.html

La 14an de februaro, en Valencio okazis la Ĝenerala Kunveno de ties membraro. Fine de la kunveno oni faris kortuŝigan omaĝon al la Prezidanto de la asocio, S-ro **José Pérez Sempere,** pro lia grandega, multjara kaj sindona laboro por la asocio. Oni enmanigis al li belan memorŝildon, por kies aĉeto kontribuis la membroj de la asocio.  S-ro Sempere estas la animo de la Grupo. Konstanta laboranto, ĉeestanto, solvanto de la problemoj, kaj kiu dum multaj jaroj tenis vivan la torĉon de Esperanto en Valencio, kaj la amikecon inter la membroj.

**ESPERANTA MONDO**

La festado de la 150-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof estis solene inaŭgurita en la sidejo de **Unesko** en Parizo, kiu jam okaze de lia 100-a datreveno agnoskis la eksterordinaran signifon de lia vivoverko, proklamante lin unu el la grandaj personecoj de la homaro.

**Esperantaj TV-kanaloj**: "Esperanto-Muzik'-TV"
http://worldtv.com/esperanto_muziko_tv ;"Esperanto-Humur'-TV".
http://worldtv.com/humuro_tv_esperanto ; "Esperanto-TV" ĉe http://esperanto-tv.com/
aperis ankaŭ tria nova TV-kanalo ĉe http://www.mogulus.com/esperanta

La aŭtomata tradukilo **Apertium** (kiu jam havas la parojn hispana kaj kataluna al Esperanto) ĵus aldonis la paron angla al Esperanto, kvankam ĝi havas problemojn pri la akuzativo: http://www.apertium.org/

**Filmeto** de Enrique Andrés kiu propagandas esperanton:
. http://www.vimeo.com/2871191.

Denove en 2009 **UEA** estos proponita al **Nobel Pacpremio**: proponis ĝin la Pola Parlamento.

Artikolo de Toño del Barrio pri la esperantisto kaj financisto **George Soros**:
http://www.soitu.es/participacion/2009/02/03/u/tonyo_1233684853.html

## EŬROPA PARLAMENTO

Eŭropa Parlamentanino, Ljudmila Novak, prezentis en Komitato por Kulturo sub la signo: PE 416.668v01-00 kadre de debato pri la raporto/opinio pri multlingveco de Vasco Graca Moura tri proponojn pri ŝanĝoj de artikolo 4:

Propono pri ŝanĝo:....4b. (nova) proponas, ke konservante kaj uzante vivajn lingvojn, estimante lingvan diversecon kaj stimulante lernadon de diversaj lingvoj, oni pristudu la eblon kaj utilon de enkonduko de komuna artefarita lingvo en EU, ekzemple Esperanto. Nur ĝi povus faciligi interkompreniĝon en Eŭropo kaj kun loĝantoj de aliaj kontinentoj, ĉar ĝi estas simpla por lernado kaj uzo.

Propono de ŝanĝo:

4.c. (nova) konstatas, ke la enkonduko de eŭro kiel komuna eŭropa monunuo, ege faciligis komercadon inter la ŝtatoj kaj helpis al ekonomia kresko kaj pli granda stabileco en EU. Similajn efektojn povus havi ankaŭ enkonduko de komuna komuniklingvo, kiu ja neniel forigus aŭ limigus uzon de naciaj kaj aliaj vivaj lingvoj uzataj en EU.

## VENONTAJ KONGRESOJ

6-a ĝis 9-a de Marto **Iberia Renkontiĝo 2009** ("Duria Plonĝado") Oporto. www.esperanto.pt/ir2009 kaj en www.esperanto.es

8-a ĝis la 14-a de aprilo. 33-a Internacia Junulara Festivalo (IJF) La festivalejo estos antikva episkopa feria sidejo kiu troviĝas en Giulianova, ĉarmega urbo de Abruco kiu troviĝas ĉe la Adriatika marbordo. http://iej.esperanto.it/ijf/2009,

28-a de majo ĝis 3-a de junio 68-a Eŭropa Esperanto-Kongreso. Herzberg am Harz (Germanio)

2-a ĝis 5-a de julio 68ª Hispana Kongreso de Esperanto kaj 14ª Andaluzia Kongreso de Esperanto. Malago. www.esperanto.es Speciala prezo por aliĝoj ĝis la 28 de februaro.

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Niaj konversacia-rondoj okazas **ĉiulunde**, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

**2an de marto**, je la 19,00h kunbabilado. Gvidas Juan del Castillo
**16-an de marto** je la 18,30h Komentitaj Lumbildoj “Nia Hispanio: Córdoba”

**17-an de marto** la grupo **"Le Punk"**, kiu ludis kanton en Esperanto "La lukto estas perdita" prezentos diskon en Madrido: **SALA EL SOL**. Anticipada: 12 euros/ Taquilla: 15euros Puertas: 22:00h/ Concierto: 22:30h www.ticktackticket.com

Pri la renkontiĝo en **Finnegans** (Pl. Salesas) oni informos en la forumo Esperanto_madride.

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid

# “Verda Stelo”
## 25 jarojn kantante en Esperanto

La koruso Verda Stelo estis kreita de Pedro Vilaroig kaj Juan Carlos Ruiz en la jaro 1984, ene de Madrida Esperanto-Liceo, kun la celo krei novan koncepton de muzika ludado. La koruso komencis kanti en Esperanto, unue en malgrandaj esperantistaj kunvenoj kaj iom post iom etendante siajn ludadojn al pli ampleksa spaco. Ĝi riĉigis sian repertuaron per folkloro kaj klasikaĵoj en aliaj lingvoj, cele al aŭdaca kaj ampleksa formo de arta ludado.

Okaze de la Universala Kongreso de Esperanto ĝi prezentis, en la Muzika Palaco de Valencio, la kantaton en Esperanto "La profil' de viaj spuroj", komponita, surbaze de teksto de Miguel Fernández, fare de ĝia direktoro kaj fondinto Pedro Vilaroig, akompanata de la Simfonia Orkestro de Valencio. La koruso Versa Stelo estas membro de la Korusa Federacio de Madrido, partoprenante en ĝiaj aktivecoj ene kaj ekster la Madrida Komunumo.

La Korusa Asocio Verda Stelo stariĝis oficiale en Madrido la 12an Decembro 1985.

La celoj de ĉi asocio estas:

Promocii inter siaj membroj la emon al la korusa muziko en ĉiuj landoj kaj kulturoj.

Promocii inter siaj membroj la intereson por la internacia lingvo Esperanto kaj ĝia rilato kun la muziko kaj la folkloro.

Disvolvi sociajn, kulturajn kaj muzikajn aktivecojn same enlande kiel eksterlande, kun speciala atento al la publika prezentado de korusaj komponaĵoj.

Esti vehiklo de kultura interŝanĝo inter diversaj etnoj per la muziko kaj la lingvo Esperanto.

En la jaro 1987 estiĝis la Orkestro Verda Stelo, kiu koncertis kaj akompanis la koruson dum kvin jaroj.

Nuntempe la koruso, direktita de Laura Carballo, havas proksimume tridek gekantistojn kaj faras siajn kantoprovojn en la preĝejo San Francisco el Grande de Madrido; en ĉi preĝejo ĝi partoprenis en kelkaj elsendoj de la Hispana Televido. Ĝia partopreno estas petata por ĉiaspecaj prezentadoj, kiuj ampleksas konkursojn (Habaneras de Torrevieja) , recitalojn en privataj centroj, akademiaj eventoj, kulturcentroj, geedziĝoj, kongresoj, omaĝoj, Nacia Aŭditorio, Teatro Monumental, ktp. (ĝi estis alvokita por la amasa koncerto en Madrido, fiaskinta pro la pluvo, de la franca muzikisto Jean Michele Jarre).

Lastatempe (11an Januaro 2009) ĝi aperis en la programo "Conciertos" de la dua ĉeno de la Hispana Televido, en kiu ĝi partoprenis en la prezento de la "zarzuela" "Viva la Verbena", de Luis Aguilé. Kaj la 15an de februaro akompanis la meson en TVE-2.

Ĝia repertuaro en Esperanto estas multnombra, en kiu elstaras la "Ave Maria" komponita de Pedro Vilaroig.

Lupe kun datumoj de inter-reto

PETICIÓN AL PARLAMENTO EUROPEO POR UNA EDUCACIÓN COMÚN EUROPEA BASADA EN IMPARTIR LAS ASIGNATURAS COMUNES EN INGLÉS; Y COMPLEMENTARLAS CON LAS LENGUAS ESTATAL, REGIONAL Y ESPERANTO.

Petición presentada por: Ramón Maynou Ferreres ciudadano español *. y Alberto Manuel Campos Gil ciudadano español el 14 de diciembre de 2008

* Ramón es socio de HEF

CONSIDERANDO QUE:

1. Ante la llegada al mundo de un hijo, todos los padres nos preocupamos de que no le falte nada, dentro de nuestras posibilidades socio-económica y culturales. Pero solamente unos pocos padres pueden escolarizar a sus hijos en colegios donde las asignaturas comunes se enseñen en inglés, y así disfrutar de una educación que le permita desarrollarse humana y profesionalmente en un mundo cada vez más globalizado, donde el dominio del inglés es imprescindible para acceder a los mejores puestos laborales en IGUALDAD de condiciones.

2. La mayoría de estudiantes europeos eligen el inglés como primera lengua extranjera. Dicha elección permite incrementar la MOVILIDAD estudiantil, docente y laboral de los ciudadanos al disponer de una lengua común.

3. Los padres también queremos que se enseñe la lengua materna, ya sea la lengua estatal o regional, cumpliendo con el principio de RESPETO a las culturas y lenguas minoritarias.

4.- Una petición realizada a favor del esperanto, por medio de una recogida de firmas (entre los firmantes muchos eran padres) obtuvo por parte de la UNESCO las siguientes resoluciones donde se indica que "los resultados alcanzados mediante el idioma internacional esperanto en el ámbito del intercambio intelectual internacional y de la compresión mutua entre los pueblos del mundo responden a los objetivos e ideales de la UNESCO" e "invita a los Estados Miembros … que promuevan … el esperanto en la escuelas e instituciones de enseñanza superior". Dichas resoluciones de la UNESCO nos proporcionan otra lengua común y cuarta lengua en la enseñanza, según lo recomienda la UE.

5. El esperanto tiene su origen en lenguas europeas y su estructura es regular, lo que la convierte en una lengua pedagógica que facilita el aprendizaje de otras lenguas. El esperanto por su facilidad puede ser aprendido simultáneamente por profesores y alumnos.

6. La enseñanza del inglés y del esperanto, como lenguas comunes, favorecerán la comunicación y la UNIÓN de los ciudadanos; y las lenguas estatales y regionales preservarán la DIVERSIDAD lingüística de Europa. Esta petición es un manifiesto por una lengua común que la convierte en una lengua de todos, a la que todos aportamos, y por esto, nos une y hará realidad la divisa de Europa: "UNIDA EN LA DIVERSIDAD".

7. La carta de Derechos fundamentales de la Unión Europea (articulo 14) garantiza: "El DERECHO de los padres a asegurar la educación y enseñanza de sus hijos conforme a sus convicciones religiosas, filosóficas y pedagógicas". Por lo tanto, la educación no es un servicio público sino un derecho, y los poderes públicos son subsidiarios de los padres y de la iniciativa social. Pero nos encontramos ante una situación en la que no depende de los padres, sino de las instituciones: el hecho de que nuestro hijo pueda disfrutar de una educación según los deseos de los padres.

Como padres europeos ejerciendo nuestros derechos, PEDIMOS AL PARLAMENTO EUROPEO QUE:

8. Tome las decisiones necesarias para que nuestros hijos reciban una EDUCACIÓN COMÚN en toda Europa basada en impartir las asignaturas comunes en inglés; y complementarlas con las asignaturas de lenguas estatal y regional, para preservar el patrimonio lingüístico europeo, y una asignatura de esperanto para facilitar la enseñanza de lenguas y la comprensión entre los pueblos.

9. Por su interés, esta petición se hace extensiva a la UNESCO en el Año Internacional de los Idiomas 2008 y a los Ministros responsables de la Educación de los países que participan en el Proceso de Bolonia para la creación del Espacio Europeo de Educación Superior.

10. El futuro de la UE puede estar en el acierto de las decisiones de nuestros representantes políticos de hoy, y de hecho está en sus manos.

# “Verda Stelo”
## 25 jarojn kantante en Esperanto

La koruso Verda Stelo estis kreita de Pedro Vilaroig kaj Juan Carlos Ruiz en la jaro 1984, ene de Madrida Esperanto-Liceo, kun la celo krei novan koncepton de muzika ludado. La koruso komencis kanti en Esperanto, unue en malgrandaj esperantistaj kunvenoj kaj iom post iom etendante siajn ludadojn al pli ampleksa spaco. Ĝi riĉigis sian repertuaron per folkloro kaj klasikaĵoj en aliaj lingvoj, cele al aŭdaca kaj ampleksa formo de arta ludado.

Okaze de la Universala Kongreso de Esperanto ĝi prezentis, en la Muzika Palaco de Valencio, la kantaton en Esperanto "La profil' de viaj spuroj", komponita, surbaze de teksto de Miguel Fernández, fare de ĝia direktoro kaj fondinto Pedro Vilaroig, akompanata de la Simfonia Orkestro de Valencio. La koruso Versa Stelo estas membro de la Korusa Federacio de Madrido, partoprenante en ĝiaj aktivecoj ene kaj ekster la Madrida Komunumo.

La Korusa Asocio Verda Stelo stariĝis oficiale en Madrido la 12an Decembro 1985.

La celoj de ĉi asocio estas:

Promocii inter siaj membroj la emon al la korusa muziko en ĉiuj landoj kaj kulturoj.

Promocii inter siaj membroj la intereson por la internacia lingvo Esperanto kaj ĝia rilato kun la muziko kaj la folkloro.

Disvolvi sociajn, kulturajn kaj muzikajn aktivecojn same enlande kiel eksterlande, kun speciala atento al la publika prezentado de korusaj komponaĵoj.

Esti vehiklo de kultura interŝanĝo inter diversaj etnoj per la muziko kaj la lingvo Esperanto.

En la jaro 1987 estiĝis la Orkestro Verda Stelo, kiu koncertis kaj akompanis la koruson dum kvin jaroj.

Nuntempe la koruso, direktita de Laura Carballo, havas proksimume tridek gekantistojn kaj faras siajn kantoprovojn en la preĝejo San Francisco el Grande de Madrido; en ĉi preĝejo ĝi partoprenis en kelkaj elsendoj de la Hispana Televido. Ĝia partopreno estas petata por ĉiaspecaj prezentadoj, kiuj ampleksas konkursojn (Habaneras de Torrevieja) , recitalojn en privataj centroj, akademiaj eventoj, kulturcentroj, geedziĝoj, kongresoj, omaĝoj, Nacia Aŭditorio, Teatro Monumental, ktp. (ĝi estis alvokita por la amasa koncerto en Madrido, fiaskinta pro la pluvo, de la franca muzikisto Jean Michele Jarre).

Lastatempe (11an Januaro 2009) ĝi aperis en la programo "Conciertos" de la dua ĉeno de la Hispana Televido, en kiu ĝi partoprenis en la prezento de la "zarzuela" "Viva la Verbena", de Luis Aguilé. Kaj la 15an de februaro akompanis la meson en TVE-2.

Ĝia repertuaro en Esperanto estas multnombra, en kiu elstaras la "Ave Maria" komponita de Pedro Vilaroig.

Lupe kun datumoj de inter-reto

PETICIÓN AL PARLAMENTO EUROPEO POR UNA EDUCACIÓN COMÚN EUROPEA BASADA EN IMPARTIR LAS ASIGNATURAS COMUNES EN INGLÉS; Y COMPLEMENTARLAS CON LAS LENGUAS ESTATAL, REGIONAL Y ESPERANTO.

Petición presentada por: Ramón Maynou Ferreres ciudadano español *. y Alberto Manuel Campos Gil ciudadano español el 14 de diciembre de 2008

* Ramón es socio de HEF

CONSIDERANDO QUE:

1. Ante la llegada al mundo de un hijo, todos los padres nos preocupamos de que no le falte nada, dentro de nuestras posibilidades socio-económica y culturales. Pero solamente unos pocos padres pueden escolarizar a sus hijos en colegios donde las asignaturas comunes se enseñen en inglés, y así disfrutar de una educación que le permita desarrollarse humana y profesionalmente en un mundo cada vez más globalizado, donde el dominio del inglés es imprescindible para acceder a los mejores puestos laborales en IGUALDAD de condiciones.

2. La mayoría de estudiantes europeos eligen el inglés como primera lengua extranjera. Dicha elección permite incrementar la MOVILIDAD estudiantil, docente y laboral de los ciudadanos al disponer de una lengua común.

3. Los padres también queremos que se enseñe la lengua materna, ya sea la lengua estatal o regional, cumpliendo con el principio de RESPETO a las culturas y lenguas minoritarias.

4.- Una petición realizada a favor del esperanto, por medio de una recogida de firmas (entre los firmantes muchos eran padres) obtuvo por parte de la UNESCO las siguientes resoluciones donde se indica que "los resultados alcanzados mediante el idioma internacional esperanto en el ámbito del intercambio intelectual internacional y de la compresión mutua entre los pueblos del mundo responden a los objetivos e ideales de la UNESCO" e "invita a los Estados Miembros … que promuevan … el esperanto en la escuelas e instituciones de enseñanza superior". Dichas resoluciones de la UNESCO nos proporcionan otra lengua común y cuarta lengua en la enseñanza, según lo recomienda la UE.

5. El esperanto tiene su origen en lenguas europeas y su estructura es regular, lo que la convierte en una lengua pedagógica que facilita el aprendizaje de otras lenguas. El esperanto por su facilidad puede ser aprendido simultáneamente por profesores y alumnos.

6. La enseñanza del inglés y del esperanto, como lenguas comunes, favorecerán la comunicación y la UNIÓN de los ciudadanos; y las lenguas estatales y regionales preservarán la DIVERSIDAD lingüística de Europa. Esta petición es un manifiesto por una lengua común que la convierte en una lengua de todos, a la que todos aportamos, y por esto, nos une y hará realidad la divisa de Europa: "UNIDA EN LA DIVERSIDAD".

7. La carta de Derechos fundamentales de la Unión Europea (articulo 14) garantiza: "El DERECHO de los padres a asegurar la educación y enseñanza de sus hijos conforme a sus convicciones religiosas, filosóficas y pedagógicas". Por lo tanto, la educación no es un servicio público sino un derecho, y los poderes públicos son subsidiarios de los padres y de la iniciativa social. Pero nos encontramos ante una situación en la que no depende de los padres, sino de las instituciones: el hecho de que nuestro hijo pueda disfrutar de una educación según los deseos de los padres.

Como padres europeos ejerciendo nuestros derechos, PEDIMOS AL PARLAMENTO EUROPEO QUE:

8. Tome las decisiones necesarias para que nuestros hijos reciban una EDUCACIÓN COMÚN en toda Europa basada en impartir las asignaturas comunes en inglés; y complementarlas con las asignaturas de lenguas estatal y regional, para preservar el patrimonio lingüístico europeo, y una asignatura de esperanto para facilitar la enseñanza de lenguas y la comprensión entre los pueblos.

9. Por su interés, esta petición se hace extensiva a la UNESCO en el Año Internacional de los Idiomas 2008 y a los Ministros responsables de la Educación de los países que participan en el Proceso de Bolonia para la creación del Espacio Europeo de Educación Superior.

10. El futuro de la UE puede estar en el acierto de las decisiones de nuestros representantes políticos de hoy, y de hecho está en sus manos.